

Johann Friedrich Hahn,

## Deziro

*tradukita de N. N. 56*

Dum promeno  
Je mateno  
Ĝojis mia koro:  
Mute, el ĝardeno  
Min salutis floro.

Do, mi restis,  
Ĉar mi estis  
Plena je admiro.  
Tamen tuj ekestis  
En la kor' deziro.

Flor' beleta,  
Ĝojopreta  
Kreitaĵo Dia,  
Jen dezir' sekreta :  
Floro, estu mia!

*Traduko de la Germana poemo "Wunsch" de JOHANN FRIEDRICH HAHN (\*1753-12-28 - †1779-05-30) en Esperanton de N. N. 56.*

*Arg-820-1645 (2013-02-06 15:02:46)*

*Tiu ĉi poemo aperis - laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann - en la jaro 1948 en la Esperanta revuo Heroldo. S-ano Kromann ne estis tute certa, ĉu la verkinto de la originalo vere estis la germana poeto Johann Friedrich Hahn, kiu vivis de 1753 ĝis 1779.*